

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La mesaĝisto

tradukita de Manfred Retzlaff

La steloj lumigas
Jen super la land'.
El for' salutigas
Vin via amant'.

Jen pendis ĉe l' pordo
gitar' sen atent'.
Eksonis la kordo
vibrigita de l' vent'.

La ĉeporda gitaro,
Ĝi estas mia kor'.²
Trans val' kaj montaro
Ĝi svingas sin for.

*Traduko de la Germana poemo "Der Bote" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2014-05-11.*

Arg-1005-2033 (2014-05-11 11:58:32)

Tiu ĉi poemo estis publikigita en la revuo "Dia Regno", n-ro 2 (905) el la jaro 2014. Pri la poeto Joseph von Eichendorff vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff.

²aŭ:Ja estas mia kor'.